# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G.PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R.DEGRELLE 12,r. Estienne d'Orves 54490 PIENNES

C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 8 F. Abono: 31 F (TTC). Kotizo: 9 F. Sume: 40 F. ====
++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

==== N° 165 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1990 ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## LE MOT DU PRESIDENT

L' été, tant attendu, arrive, apportant avec lui les vacances, le repos, le dépaysement et l' occasion de connaître bien des personnes en dehors du cercle habituel de nos relations. Parmi eux, il y aura peut-être des étrangers qui ne connaissent pas la Langue Internationale et ne pourront donc échanger avec nous que des phrases banales et stéréotypées. Quel dommage!

Mais, si la communication avec eux est sommaire, faisons-leur cependant bon visage et éveillons en eux, par notre gentillesse, le désir de mieux nous connaître. Pour un espérantiste, comme pour un chrétien, l' étranger ne doit jamais être considéré comme un intrus mais comme un hôte attendu et apprécié.

## BILETO DE LA PREZIDANTO

La tiel prisopirata somero alvenas, kunportante libertempon, ripozon, ŝanĝon de ĉirkaŭaĵo kaj la okazon ekkoni multajn homojn ekster nia kutima rondo. Inter ili, eble troviĝos alilandanoj, kiuj ne konas la Lingvon Internacian kaj sekve sukcesos interŝanĝi kun ni nur banalajn kaj ŝablonajn frazojn. Bedaŭrinde!

Sed, se la komunikado kun ili estos primitiva, ni tamen prezentu al ili amikan vizaĝon kaj veku en ili, per nia afableco, la deziron pli bone koni nin. Esperantisto same kiel kristano, neniam konsideru alilandanon kiel sintrudulon sed kiel atendatan kaj ŝatatan gaston.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## PREĜO DE LA GEEDZOJ

Sinjoro, geedziĝo ne estas meritaĵo;
ĝi estas donaco, kiun vi faras al ni.
Helpu nin, por ke ni respektu unu la alian
kaj ni klopodu kompreni nin reciproke.

Favordonu al ni la gracon akcepti infanojn,
Por ke ni kreskigu ilin liberaj kaj malkaŝemaj.
Metu en ni la deziron malfermi nian hejmon
al la amikoj, kiujn ni allogos.
Dankon, Sinjoro, pro tial valora donaco.
Helpu nin bone ĝin uzi,
Por ke ĝi parolu pri Vi al la preterirantoj.

Brigitte kaj Christian.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 11-a de FEBRUARO EN PARIS

Ĉeestis: S-ino Vincent, F-ino Preux, P-ro Bourdon, F-to Marmou, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue, Pons, Villeneuve.

Asocia agado: nia kongreso okazos en Bouresse; S-ro Bessière kaj S-ino Vincent kontaktos la lokajn episkopon kaj parohestron. P-ro Bourdon proponas, ke ni invitu anon de KELI kiel oficialan reprezentanton de tiu asocio.

Bulteno: alvoko por plibonigi la enhavon, necesas provizi la redaktorinon per materialo: kuirreceptoj, lokaj kutimoj, amuzoj..

Eksterasocia agado: P-ro Bourdon kolektas la aliĝilojn por la tendaro de la skoltoj, okazonta en Belgujo (20/27-an de aŭgusto 1990)
La venonta komitatkunveno okazos en Bouresse.

Protokolis: Henri LAFARGUE

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NIA KONGRESO EN BOURESSE

Bouresse estas ĉarma vilaĝo ne tre facile alirebla; verŝajne, tio klarigas la etan nombron da partoprenantoj (16)

La vetero estis suna kaj la etoso frata. Ni ĉiuj ĝuis la gastamon de S-ino Bourot, kiu tiel afable regas la Esperanto-centron "Kvinpetalo".

La kongrestemo "Amo al Dio, amo de Dio" interesis la ĉeestantaron kaj la diskutoj estis viglaj dank' al P-ro Bourdon, kiu funde, fervore kaj eĉ arde ĝin prezentis.

La kongresanoj ĉiutage partoprenis diservon en la bela romanika preĝejo de Bouresse, kie ili kantis la dian gloron kaj preĝis en frata rondo. Ili ankaŭ distris sin dum la vesperoj rigardante lumbildojn pri Turkujo aŭ Zambio aŭ aŭskultante prelegojn pri Esp°-verkistoj aŭ kasedon de O. Tzaut, svisa kantisto.

Ili ankaŭ ekskursis al Antigny kaj St-Savin/Gartempe por admiri romanikajn preĝejojn kun bone konservitaj mezepokaj freskoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

AGADRAPORTO 1989

Jam pasis unu jaro de kiam mi transprenis la prezidantecon de FKEA. Dank' al la bona, longdaŭra laboro de S-ro Colas, mi trovis bonfartan asocion. Dankon kaj aplaŭdon al li.

Dum la pasintaj jaro, ni havis la doloron funebri pri S-ino Michau, kiu forpasis post longa malsano. Ni ĉiuj memoros pri ŝia afableco kaj sindonemo. Ĉiam servopreta, ŝi bone laboris por nia afero. Ni preĝu por ŝi kaj la aliaj mortintaj anoj de nia asocio.

Lastjare, ni diligente agis. Nia kongreso en Nevers sukcesis dank' al la zorga preparado de F-ino Vanneau. Poste okazis en Vichy la nacia kongreso, kun la kutima diservo fare de P-ro Bourdon. Kvankam tio okazas ekster la oficiala programo, pro neŭtraleco de la landa asocio, ĉeestas kaj kredantoj kaj nekredantoj.

Bedaŭrinde, la membronombro malkreskis en la lasta jaro (156 anstataŭ 165) t.e. 6% el niaj anoj. Estas devo por ĉiu el ni konigi FKEA al la katolikaj esperantistoj kaj Esperanton al la ceteraj katolikoj.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NIA MEMBRARO

Novaj anoj: 2) S-ro CUGNY (C. d'Or); 3) S-ro MILLET (S & M)

Bonfarantoj: 3) F-ino MARTIN (A-M)

Tre koran dankon kaj bonvenon al ili!

## PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO EN BOURESSE (29/4/1990)

La kunveno komenciĝis je la 9.00 en ĉeesto de 13 homoj. Petis senkulpigon S-oj Colas kaj Thiollière, Grataloup, F-ino Goudé kaj P-ro Goudé.

Post la bonvenigaj vortoj de la prezidanto, li prezentas la agadraporton. Sekvas S-ino Vincent kun la financa raporto. Ambaŭ raportoj estas akceptitaj.

34 voĉdonintoj sendis 33 jesajn respondojn kaj al la agad- kaj al la financa raportoj.

S-ro Pons kaj P-ro Héroux kontrolis la balotadon por la renovigo de 1/3 de la komitato. El 33 senditaj bultenoj, 1 ne validis. La 32 validaj aljuĝis 32 voĉojn al S-ino Vincent, 30 al P-ro Héroux, 30 al F-ino Preux, 19 al S-ro Lafargue, 13 al S-ro Baron kaj 4 al S-ro Blot. Sekve, la 4 unuaj estas elektitaj.

En 1991, la kongreso okazos en Amiens, en 1992 en Lyon kaj en 1993 en Lourdes.

Kongrestemo por 1991: Esperantistoj kiel laikuloj.

P-ro Degrelle ne plu deziras esti peranto de IKUE. P-ro kandidatiĝas, kondiĉe, ke lia superulo jesu.

La skolta tendaro okazos apud Namur de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1990. Nikolin' kantos kaj instruos. P-ro Bourdon informas.

P-ro Bourdon sugestas, ke oni menciu FKEA en la katolika agendo. Aprobite.

Protokolis: Dominique Baron

### KOMITATKUNSIDO

<u>Nova komitato</u>:

| | | |
|---|---|---|
| Honorprezidanto: | | S-ro COLAS |
| Prezidanto: | | S-ro BESSIERE |
| Vicprezidantoj: | 1) | S-ro LAFARGUE |
| | 2) | S-ro PONS |
| Sekretariino: | | F-ino PREUX |
| Helpsekretario: | | S-ro PONS |
| Kasistino: | | S-ino VINCENT |
| Helpkasisto: | | S-ro VILLENEUVE |
| Religia konsilanto: | | P-ro BOURDON |
| Helpkonsilanto: | | P-ro HEROUX |
| Membroj: | | P-ro DEGRELLE |
| | | F-to MARMOU |
| | | S-ro DESPINEY |

La kunveno komenciĝis je la 12.00 kaj finiĝis je la 12.30.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## LINGVA ANGULO: PRI LA ADJEKTIVOJ

Rimarku la sekvantajn frazojn:

1) Nigraj kaj blankaj bovinoj staras sur la kampo
2) Nigra-blankaj bovinoj staras sur la kampo
3) Flave-ruĝaj bovinoj staras sur la kampo

La koloroj de la bovinoj estas diversaj kaj vi devas ne konfuzi ilin:

En la frazo 1 temas pri pluraj bovinoj; kelkaj estas blankaj, aliaj estas nigraj. Oni akordas la du adjektivojn kun la substantivo bovinoj.

En la frazo 2 temas pri bovinoj, samtempe nigraj kaj blankaj, do nigraj kun blankaj partoj. La du adjektivoj estas kunligitaj per streketo kaj oni akordas nur la duan elementon blankaj.

En la frazo 3 la bovinoj havas unu koloron, kiu venas de la miksado de la flava kaj ruĝa koloroj (roux). La unua adjektivo havas la finaĵon e kaj restas nevaria; ĝi estas ligita per streketo al la dua adjektivo, kiu sola akordiĝas. Oni povus ankaŭ skribi flavruĝaj en unu vorto.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

### NEKROLOGO

Ni priploras la forpason de tri el niaj anoj: Pierre REGNIER el Quillan (Aude), Claude NIQUET, monaĥo en N.D. de Lure (A. de Hte-Provence) kaj Georges GIRAULT el Baugé.

Ni prezentas al iliaj familianoj nian plej fratan kunsenton kaj preĝas por la ripozo de tiuj tri animoj.

## O AMSPIRITO

O Amspirito, kreanto kaj sanktiganto de la animoj, kies unua tasko estas transformi nin simile al Jesuo, helpu min, Amspirito, obei al Jesuo, pensi kiel Jesuo, paroli kiel Jesuo, ami kiel Jesuo, suferi kiel Jesuo, en ĉio agi kiel Jesuo.

Restadu ĉiam en mi kaj, per via graco kaj via kunlaborado, estu la efektiviganto de la planoj de Dio Patro sur mia animo. Same kiel vi estris la Sanktan Homecon de Nia Sinjoro dum lia restado sur la tero, estu ankaŭ ĉi tie la motoro de mia vivo, la animo de mia animo.

Sankta Spirito, Amspirito, mi dediĉas min al vi, prenu mian volon, de nun ĝi estas senrezerve via. Dankon pro tiom da ricevitaj gracoj, pardonon pro tiom da gracoj iĝintaj senutilaj. Venu en min, invadu min.

Mi volas iĝi plene instruebla kaj vivi fidele je la plej etaj tuŝoj de viaj diaj inspiroj. Vi estas Spirito de vivo, Forto kaj Lumo, estu mia vivo, mia lumo kaj mia forto. Vi parolas al la animo en la silento, donu al mi la spiriton de silento kaj primeditado. Vi malsupreniras en la humilajn animojn, donu al mi la spiriton de humileco, instruu min vivi per via amo, instruu min semi ĉirkaŭ mi la amon.

O Amspirito, fonto de paco, pacigu mian animon, faru el ĝi vian ĉielon, vian ŝatatan loĝejon, la lokon de via ripozo; mi estu tie tute liverita al via krea ago, Amspirito. Mi malsatas, venu nutri min; mi soifas, venu sensoifigi min; mi estas blinda, venu gvidi min; mi estas malriĉa, venu riĉigi min; mi estas senscia, venu instrui min.

O Sankta Spirito, Amspirito, mi dediĉas min al vi, mi donas min al vi, mi fordonas min al vi per Maria, via Templo, per Maria, via Edzino, per Maria, la kanalo de viaj gracoj. Amen.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## KONGRESO EN AMIENS

ALVENO: 26-a de aprilo vespere
FORVETURO: 1-an de majo post la tagmanĝo
PERANTO: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE Tel. 41 89 29 47.
LOKO: Institut des Missions 37, rue Wasse 80000 AMIENS Tel. 22 46 05 65.
KOTIZOJ: unuopulo 50 F; geedza paro: 80 F; infano ĝis 16-jara, blindulo, kriplulo, sacerdoto, religiul(in)o, KELI-ano: senpage.
PAGOJ: Association Catholique Française pour l' Esperanto p.ĉ.k. 2324 93 N ROUEN
LIMDATO: 15-an de aprilo 1991.
RESTADPREZO: ĉirkaŭ 160 F tage.

Pliaj informoj, programo kaj aliĝilo aperos en venonta bulteno.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## DIRAĴOJ EL CHIARA LUBICH (daŭrigo)

66. Anstataŭ iri ekskluzive al tiuj, kiujn vi opinias simpatiaj, turnu vin al ĉiuj, kiujn la cirkonstancoj renkontigas al vi, sen diskriminacio nek sindeteno.
67. Ĉio temas pri kora afero. La koro perfidas, la koro distras, la koro savas laŭ la objekto de sia amo.
68. Jesante al la etaj aĵoj, oni trejniĝas al la grandaj.
69. Ni estu la konsolo de la malfeliĉulo, de la afliktulo.
70. Estu unuecfaranto.
71. Oni diras, ke la amo estas blinda; nenio estas pli malvera; ĝi estas helo kaj lumo.
72. Faru el la obstaklo saltotabulon.
73. La belo estas boneco, vero, justo, korpardono celantaj al la unueco. La belo estas unueco. Jen kial la mondo tiel strebas al la belo: ĝi estas la plej pura manifestiĝo de Dio.
74. Nia planedo sopiras al amo... Kaj pensu, ke dependas nur de ni por ke la amo superverŝiĝu!
75. Filtru la parazitajn bruojn de la mondo por plilaŭtigi la voĉon de via konscienco.
76. La mondo plenplenas je belaj ideoj kaj voloj bonaj, sed senfruktaj, kiam mankas al ili amo.
77. Dio suferas kun la suferanta homo.

(daŭrigota)

## MALNOVA ANGLA LEGENDO (fino)

Kaj kiam aùdiĝis la noktomeza sonorilado, la animo de la povra Dano forflugis al la ĉielo. Li venis en Anglujon pro deziro al gajno, esperante trovi tie grandan profiton, kaj li ne konsciis, ke li trovos la solan utilaĵon, kompare kun kiu ĉiuj reĝaj trezoroj estas nur polvo kaj sablo."Je la dia parolo" diris en si la reĝino,"mi taksas ĉi tiun mortinton nun loĝanta kun la anĝeloj, kaj tion mi ne scias el homa buŝo, sed el la diro de Dio mem, kiu sur sia sufera kruco certigis al la pentanta ŝtelisto, ke jam la venontan vesperon li estos kun Li en la paradizo".

La tutan nokton ŝi restis en preĝoj; poste, kiam venis tio, kion oni apenaù kuraĝus nomi tagon, tiel nube nigra estis la ĉielo, ŝi fosis la teron per siaj propraj manoj por sepulti la beatulon. Metinte sur la tombon du branĉojn krucoforme, ŝi genuiĝis kaj diris kun konfido:"Ho Dio, kiu montris Viam povon forprenante tiun animon el Satano, kiu ĝin posedis, savu ankaù Anglujon el tiu terura malbeno, kiu ĝin tenas. Dank' al Vi, ĉu la Kristnaska nokto ne fariĝis la Sankta-Neniamo, ĉar animo atingis Vin en Via gloro?"

Tiumomente ŝajnis, kvazaù granda mano disŝirus la nubojn en la ĉielo, dum granda suno reaperis por konsoli la vunditan teron. Supernatura ĝojo plenigis la koron de la reĝino: la infera kontrakto, kiu ligis Anglujon al la Demono, estis rompita de Dio mem. Kompreninte, ke io granda okazis, la povraj vilaĝanoj, kiuj ĵuse enterigis la mortintojn, alkuris al la kabano, kie la reĝino rakontis al ili la mirindaĵojn de la graco kaj la sanktan morton de tiu, kiun ili indulgis. Kortuŝite siavice, ili genuiĝis sur la tombo, kaj supreniris al Dio belaj preĝoj, sendube elaùdotaj.

La sekvinta jaro estis la plej feliĉa, kiun iam Anglujo spertis: ĉie la tritiko redonis grajnojn centoble, okazis nek hajlo nek epidemio, la reĝujo retrovis la riĉon kaj la ĝojon. Eĉ se tro multe da Angloj forgesis ĝin hodiaŭ, ilia lando estas la sola, kie Sankta Neniamo ekzistas; tial ĉiaj mirakloj restas eblaj kaj en la plej teruraj momentoj oni devas neniam malesperi, sciante, ke Dio ĉiam protektos Anglujon.

Trad. Bernard Aunis

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## BLANKA NOTLIBRO

Sylviane kaj Henri estas feliĉaj anonci sian geedziĝon, kiu okazos en la preĝejo Sankta Jakobo en Bergerac (Dordogne) la 2-an de Junio 1990.
Sylviane Alda - Henri Lafargue 8 bis, av. Anatole France
94600 CHOISY-le-ROI

Ni preĝu por ke ili havu longan feliĉan vivon.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## MEMBRARO I.K.U.E.

27. P-ro RUNPAOT; 28. S-ro ROYER;29. P-ro BOURDON; 30. S-ro PONS; 31. F-ino VANNEAU; 32. S-ro DEGOUL; 33. S-ro VIDONNE; 34. F-ino MATTIN; 35. S-ro BERNARD; 36. S-ro COULAT.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## ANGULO DE LA KASISTINO

Supozeble, kelkaj anoj tute ne legas la bultenon, kaj ĉefe mian alvokon p. 7 de la marta numero, ĉar ĝis nun mi ne ricevis ilian kotizon. Jen iliaj komencliteroj kun n° de ilia departemento. Ĉu tio sufiĉos por ke ili sin rekonu?

J.B.(31) E.C. (69) P.C. (01) H.D. (75) D.D.(92) J.D.(05) G.G.(33) F.L.(63) B.L.(94) A.L.(72) E.L.(49) P.M.(44) H.M.(10) S.M.(41) P.P.(76) E.R.(44) A.S.(66) G.W.(59) S-ro V.(59) M.V.(93) G.V.(61) J.V.(35)

TUJ sendu ĉekon al Association Catholique Française pour l' Esperanto p.ĉ.k. 2324 93 N ROUEN... se vi volas daùre ricevi la bultenon...

Se vi havas financajn malfacilaĵojn, skribu al mi kaj mi certe trovos ian solvon. Nepre montru, ke vi ankoraù vivas!

## LA KATOJ

Fervoraj geamantoj, doktuloj plej senridaj,
Per sama gusto amas, je pleno de l' sezono,
La katojn, fortajn, mildajn, orgojlon de la domo,
Ĉar same fridotimaj kaj same hejmosidaj.

Amikoj de la scio, amikoj de l' volupto,
Silenton ili serĉas, hororon de l' tenebro,
Ereb' ilin elektus rajdbestoj de l' funebro,
Se povus ĉi fiero kliniĝi al servuto.

Revante ili prenas la noblon de la pozo
De tiuj grandaj sfinksoj kuŝantaj en ripozo
Kaj ŝajne ekdormantaj en rev' senfine ajna.

Per sparkoj sorĉaj fajras la lumbo erotika
Kaj brilaj oraj punktoj, kiel de sablo fajna
Eklumas en prunelo mistera kaj mistika.

Charles BAUDELAIRE

Esperantigis Elgo

***************************************************************************

## KOTIZTABELO 1990

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 130 F
Perantoː P-ro R. DEGRELLE c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

----------

| | | |
|---|---|---|
| A.C.F.E. | kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo | 40 F |
| | Geedza paro | 50 F |
| | Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 20 F |
| | Bonfaranto | 200 F |
| | Dumviva membro | 800 F |

----------

| | |
|---|---|
| U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" | 230 F |
| U.E.A. kun "Esperanto" kaj jarlibro | 225 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

***************************************************************************

## ENHAVO

1. Le mot du président
2. Preĝo de la geedzoj
Protokolo de la komitatkunveno
Nia kongreso en Bouresse
Agadraporto 1989
3. Protokolo de la kunvenoj en Bouresse
Lingva angulo
Nekrologo
4. O Amspirito
Kongreso en Amiens
Diraĵoj el Chiara Lubich
5. Malnova angla legendo
Blanka notlibro
Angulo de la kasistino
6. La katoj

***************************************************************************

Dépôt légalː 2ème trimestre 1990
C.P.P.A.P. n° 62 532.
Directeurː René-Claude Colas
Directeur-déléguéː
René-Jean Marmou

!! Polycopié par l' A.C.F.E.
!! Prieuré St-Martin
!! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
!! FRANCE